

& Mulan:

< Rekante 27 el 53 batoj por strofo, entute 848 paŝoj dum 10 minutoj. El ĉina tradukis Saint-Jules Zee (El Ĉina Poezio, Beijing: El Popola Ĉinio, 1980). Popolkanto de la Nordaj Dinastioj (420-589 p.K.). Baladigis Martin Strid (2016) per ĉina melodio tradicia kaj aldonis rekantaĵon sur bazo de Disney-filma versio.>

(# Melodio:

<:53> (/TiLa SoTi TiLa Lado SoSo SoMi; RelMi DoRe SoMi MiSo milredo doLa a;La Lado SoLa MiMi MiSo ReDo ReRe; MiSo redo mimi MiSo milredo doLa a;

(Rekantaĵe: LaaMiMi SoRe MiSo oo;RelMi Fa aSo Re e; LaMi SooReRe MiSo oo;RelMi /Fa aSo So oo;SOSO /LALA AADoRe /MiMi i;SO LA FalMi i; /LaaMiMi SoRe MiSo o)

)×16)+

(& Strofoj:

'1 "/Ho2 ve! Ho ve!" Mulan' laboras tie ;
Si2dante antaŭ l' pordo su2r teksilo, ; Sed ne
aŭdiĝas ia sono de l' naveto ; Kro2m ripetado
de ŝia2 ĝemspiro.

(×: **Viron el vi mi faros ; ke2 venku vi ;
Forta kiel arbaro ; ka2j fajra kor' ; Se vi
trovos vian centron ; vi venko2s ; Viron el
vi mi faros.**)

'2 Pri kio ja, knabino, vi ekpensas? ; Kaj kion
tiel triste ekmemoras?" ; "Mi pri nenio pensas,
pri nenio, ; Nek ion ajn mi triste ekmemoras.
.....

'3 Mi nur mobilizilon lastvespere ; Vidis, la
batalantojn ĥan' kunvokas. ; En dekdu libroj de
l' nomlisto, ĉie ; La nomon de la patro oni
lokas.

'4 Patro ne havas ja plenaĝan filon, ; Nek mi
pliaĝan fraton, do ĉevalo ; Kun ĉiaj ekipaĵoj
estu preta, ; Mi anstataŭos patron en batalo!"
.....

'5 Sur la vendplaco orienta oni ; Aĉetas por ŝi
ĉevalon rapidan, ; Sur l' okcidenta -- selon, sur
la norda ; Vipon kaj sur la suda ĉevalbridon.
.....

'6 Matene adiaŭis ŝi gepatrojn, ; Vespere
dormis ĉe l' Rivero Flava, ; Ne aŭdis ŝi la
gepatran vokadon al filino ; Sed nur senĉesan
murmuradon de ondaro sablolava.

'7 Matene adiaŭis ŝi l' riveron, ; Vespere
dormis ĉe la Monto Nigra, ; Ne aŭdis ŝi la
gepatran vokadon al filino, ; Nur tiratan
henadon de ĉevaloj de la tribo migra.

'8 Trakuris oni fluge dekmil liojn ; Tra montoj,
fortikaĵoj ĝis la celo. ; La kornoj eĥis en aero
frosta ; Kaj maŝkirasoj brilis en lunhelo.

'9 Mortis la general' post cent bataloj, ;
Revenis la bravuloj post dek jaroj. ;

'10 La ĥan' akceptis ilin kun soleno ; En la
palac' ĉe l' triumfa reveno, ; Kaj ilin
rekompencis per honoraj ; Titoloj kaj
grandkvant' da monoj oraj.

'11 La ĥan' demandis, kion Mulan volas, ; Kiu
respondis: "Mi oficon altan ne bezonas. ; Por
tuj reveni al la patra domo, mi esperas ; Ke via
moŝt' kamelon flugan donas."

'12 Aŭdinte la alvenon de l' filino, ; Gepatroj
kune iris al la antaŭurb' piede; ; Aŭdinte la
alvenon de l' fratino, ; Ŝia fratin' pliaĝa sin
okupis tualete;

'13 Kaj jam tranĉilon la plej juna frato ;
Akrigis kun fervor' por porko- kaj ŝafobuĉado.
; La pordon de la ĉambro ŝi malfermis, ; Kaj
sur la lito side ripozetis,

'14 Demetis la soldatan kamizolon ; Kaj la
malnovajn vestojn resurmetis, ; Antaŭ spegul'
aranĝis la hararon ; Kaj sian tualeton
ekenketis.

'15 Nun ŝi eliris al la kamaradoj, ; Kiu miregis
ekvidante ŝin; ; Oni pasigis kune dekdu jarojn,
; Sed sciis ja neniu, ke Mulan estas virin'.

'16 Vira leporo kun ĝojsaltaj kruroj ; Kaj ina
kun rigardo dolĉe brila ; Se du leporoj tiel iras
kune ; Kiu distingi povus do la inan de la vira?
.....)